



**3(167)  
2018**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

## MIA KATO

vortoj kaj muziko: Emanuele Rovere (Manŭel)

Havas mi nigran katon  
inteligentan kaj simpatian.  
Mi trovis lin, iun tagon,  
ĉe l'enirejo de l'hejmo mia:  
timema kaj malsata,  
de iu malbonulo forlasita;  
miaŭoj min igis pli ol kortuŝita.  
Donis mi bonajn manĝojn  
kaj lin regalis per ĝentilo mia.  
Ŝufiĉis du semajnoj:  
li reakiris tutan forton sian,  
fariĝis li la reĝo  
de la ĝardeno kaj de l' ĉirkaŭaĵo.  
Nun li surprizas per tiu ĉi strangaĵo:



Mia kato, mia kato ŝatas tre fortajn karesojn.  
Li pensigas min pri l'homoj, kiuj celas la ekscesojn,  
ekstremajn sensaciojn, plenton de adrenalino,  
kontraŭ baroj, preter limoj, por aventur' sen fino.

Kiam mi ekbalaas, li tuj kuŝiĝas apud piedoj miaj.  
Karesojn de mi li petas,  
ĉu mi konsentu al postuloj liaj?  
Mi lasu balailon,  
prefere prenu akran frastilon.  
Ĉu iam vidis vi pli strangan scenon?

Mia kato, mia kato, ŝatas tre fortajn karesojn.  
Li pensigas min ...

La teksto kaj melodio de ĉi versaĵo tre plaĉis al ĉiuj partoprenantoj  
de la klubaj okupoj kaj estis tre volonte kantata de ili.

## Kuraĝa inventisto de esprimoj. Pri la literatura verko de Antoni Grabowski.

Antoni Grabowski (1857 – 1920) elstara sciencisto kaj esperantisto de la komenca periodo, reprezentanto de varsovia intelektularo, studis en vrocłava universitato filozofion, fremdajn lingvojn, naturajn kaj teknikajn sciencojn.

Kiel inĝeniero-kemikisto li laboris en Pollando, Ĉeĥio kaj Rusio. Li publikigis multajn scienc-laboraĵojn kaj artikolojn, kaj polan teknikan vortaron.

Li estis poligloto, diversgrade konis ĉirkaŭ 30 lingvojn. Ne estas fremda por li volapuko, sed ĝi lin seniluziigis pro la malfacileco, ĉar eĉ ĝia aŭtoro, prelato Schleyer dum la interparolo utiligis la vortaron.

Esperantisto fariĝis Grabowski tuj post apero de Unua Libro, en kiu la aŭtoro Ludoviko Lazzaro Zamenhof arigis principojn de la nova lingvo (1887). ravigis lin strukturo kaj logikeco de verko de Doktoro Esperanto.

En la unua periodo de disvolviĝo ĝis la I mondmilito akompananta al la lingvo literaturo havis karakteron ĉefe tradukan. Ĉar la lingvo mem laŭ la elirpunkto devis servi al alproksimiĝo de la nacioj ĉe estimo por la nacia aparteco kaj akcepto de fremda kulturo – de literaturo oni atendis la samon. Malpli esencaj do estis originalaj literaturaj esprimaĵoj, pli dezirata laboro prezenti al la plej granda rondo de ricevantoj valorojn kulturajn jam kontrolitajn. Krome ankoraŭ kontinue oni kontrolis utilon de tiu nova lingvistika pripensoj por celoj pli komplikigitaj ol konversacio ĉe teo.

Ĝis 1904 j. oni inter alie publikigis jenajn esperantigitajn verkojn: **Hamleto** de Ŝekspiro, fare de Zamenhof mem, **Demono** de Lermontov kaj **Boris Godunov** de Puŝkino, ambaŭ perplume de Vasilij Devjatnin, **Iliado** de Homero kaj **Kaino** de Bajrono, kiujn tradukis Antono Kofman.

La unua verko de Antoni Grabowski en lingvo Esperanto aperinta en 1888 j. estis traduko de romantika rakonto de Puŝkino s.t. **Neĝblovado**. Ĉi provon traduki el rusa originalaĵo la aŭtoro pri-traktis kiel lingvan ekzercon. En la j. 1889 aperis traduko de komedio de Goeto **Gefratoj**. Ĵus post tiuj tradukoj el rusa kaj germana lingvoj Grabowski rilate malfrue okupiĝis pri tradukoj el la lingvo gepatra. Ili estis noveloj de Prus kaj Sienkiewicz.

En tempo-periodo de emoj reformi la lingvon Grabowski proponis provojn, kiuj laŭ lia opinio povus influi avantaĝe al belo de Esperanto. Ili ne estis multaj. La modifoj rilatis al la enkonduko **lo** anstataŭ ĝi, **ed** anstataŭ kaj, enkonduko en vortoj harmonio, familio, radio kaj similaj – konsonanton **j** anstataŭ vokalo i (harmonjo, familjo, radjo). Ankaŭ por vortoj de tipo nebulo, okulo, sukero kaj similaj li proponis la internan elizion helpe de ena apostrofo, likvidantan la enan vokalon (neb'lo, ok'lo, suk'ro). Tiuj modifoj ŝanĝus akcenton en plimulto da eŭropaj lingvoj, do ili ne povis esti bonŝancaj.

En ĉi milde reformita lingvo Grabowski eldonis libron **La liro de la Esperantistoj** (1893). La aro enhavas 110 poemojn de 24 aŭtoroj tradukitajn ĉefe el germana kaj rusa lingvoj, sed ankaŭ el angla, pola, itala, hungara kaj latina. En ĉi publikaĵo oni presis ankaŭ 27 poemojn originalajn de 12 poetoj, el kiuj distingiĝas Ludoviko Zamenhof mem, lia frato Felikso, Antoni Grabowski, la rusa judo Mozes Goldberg kaj ruso Vasilij Devjatnin. Iliaj versaĵoj krom nebanala temaro rekomendiĝas pro manko de „la ĉefa peko” en esperanta poezio, tiel nomataj „adasismoj” – rimoj gramatikaj atingataj helpe de sufiksoj, ĉefe per precipe malaprobata „-adas”: laboradas – batadas, soifanta – militanta, kolegaro – homaro, laciĝas – perdiĝas, bloveto – urbeto, rapideco – kuraĝeco ktp.

Post voĉdonado de legantoj en la j. 1894 („La Esperantisto”), dum kiu oni malakceptis ĉiujn proponitajn de li ŝanĝojn, Grabowski fariĝis denove rigora uzanto de la samaspektigita lingvo, la reformajn emojn konservante por estonteco.

En la j.1904 Antoni Grabowski kun la familio ekloĝis en Varsovio, kio igis oftajn kaj ambaŭflanke aprecatajn kontaktojn kun Ludoviko Zamenhof. Li sian tradukan verkon subigis sub kritikon, konsilojn kaj instigojn de la Majstro.

Pli kaj pli intensa fariĝas en tiu tempo lia verko originala. La versaĵoj tuŝas esperantajn aferojn. **Tagiĝo** kun muziko de Barański estas traktata kiel la dua esperanta himno de la medio. Alia

beletraĵo **La reveno de l' filo** estis verkita okaze de Universala Kongreso de Esperanto en pola, kvankam sub aŭstria okupado Krakovo, en la jaro 1912. **Sur unu kordo. Defendo de l' rimo** estas plena de humoro ekzemplo de grava por la disvolviĝanta lingvo problemo, ke oni povas verkante poemojn eviti rimojn apogitajn je la samajn finaĵojn, ne farante samtempe la sonan monotonecon.

Pri agnosko por tradicio de la pola romantismo kaj verko de Juliusz Słowacki atestas du tradukoj de Grabowski **En Svisujo** (1904) kaj **La patro de pestuloj** (1905).

En ĉi tempo Grabowski la same intense agas en la Esperanto-movado. Li prezidas al Varsovia Societo Esperanto (1904), kaj poste, de la j. 1908 al Pola Societo Esperanto, plenumante ĉi rolon ĝis la morto.

Venas pliaj tradukoj de Sienkiewicz – liaj noveloj.

La mondan aprobon dum la krakova mondkongreso en 1912 j. akiris traduko de libreto al opero **Halka**, kies aŭtoroj estas Moniuszko (muziko) kaj Wolski (teksto) kaj de kvinakta tragedio **Mazepa**, kiun verkis Słowacki.

En la jaro 1913 aperas **El Parnaso de Popoloj**, pli ol 200-paĝa antologio de diversnaciaj poetoj verkantaj en diversaj lingvoj, konsistanta el 6 originalaj kaj 110 tradukitaj versaĵoj.

Komenco de la unua mondmilito ĵetas A. Grabowski al Toruno, de kie li ne povis reveni Varsovion. Kiam finfine li povis tion fari, trovis la hejmon malplena, sen la familio, kiu elmigris al Rusio. Sola, febla pli kaj pli malsana je la koro li komencas pezan laboron ĉe traduko de vasta epopeo **Sinjoro Tadeo aŭ La lasta armita posedopreno en Litvo**. Nobelara historio de la jaroj 1811 kaj 1812 en dekdu libroj verse de Adam Mickiewicz. Ĝia teksto estis finita kaj publikigita en la 1918 j.

Ĝi estis entrepreno granda – preskaŭ naŭ miloj da versoj kun rimoj kontinuaj aa bb cc. Metrike fariĝis apero entute nova en la esperanta poezio. Formita en poezio de okcidento, ĉefe en Francio kaj ĝenerale uzata de okcidentaj poetoj **aleksandro** – versaĵo 12-silaba kun cezuro post la sesa silabo ne estis utiligita de la pola tradukanto. Grabowski ekproponis provitan jam cetere en **Mazepa metrum** de originalo – verson 13-silaban kun cezuro post la sepa. Oni nomis ĝin **pola alaksandro** kaj substrekadis en rimarkoj pri **Sinjoro Tadeo**, ke la teksto estis esperantigita "formfidele", do entute konkorde kun la originalo. Eĉ rigoraj konantoj de ĉi temo aprezas ĝiajn sonajn valorojn, precipe ĉe bona deklamado.

Stilo de la verko estas pli versforma romano ol klasika epopeo. Rakonto pri vivo kaj konfliktoj de pola nobelaro, aventuroj, trompoj, perfidoj, agreso, krimoj, heroaj agoj, pardono, realaĵoj de la ĉiutaga vivo postulis ne iel ajnan vortan inventemon.

Nomojn, antaŭnomojn kaj nomojn de lokoj lasis Grabowski plejparte en la originala formo alĝustigante ilin al esperanta ortografio – Zosja, Macjek, Jankiel, Jacek, Vojski, Horeŝko, Soplicovo, Dobĵin. Ilia tasko estis substreki lokan koloraron kaj slavan ekzotikon. Litvo, Moskvo, Vjeno, Njemen konservis nomojn uzatajn de Zamenhof. Esperantigitaj estis antaŭnomoj Tadeo, Gervazo, Protazo. Tadeo tamen iufoje elpaŝas kiel Tadeuŝ aŭ Tadeuŝo eble pro emo konservi ritmon. Alnomoj de Jacek Robak kaj de etaj nobeloj prezentiĝas en versio esperanta – Vermo, Vergo, Aspergisto, Verŝilo.

La inventemo lingva de Grabowski okazis multfoje trafa. El 209 neologismoj uzitaj en **Sinjoro Tadeo** pli ol duono troviĝis en Plena Ilustrita Vortaro.

Aplikante ĝenerale parolturnojn **ĉi tablo, ĉi strato** anstataŭ pli malnovaj zamenhofaj formoj ĉi tiu tablo, ĉi tiu strato aŭ por signali, ke io komencis okazi de la difinita momento – uzante vorton **ekde** – ni ne memoras, ke ambaŭ finsolvojn enkondukis Grabowski.

Nun Juĝiston, jam ekde unu hor' en dormo

Li vekas; ŝajne venis li kun novinformo [S.T. I, 984, 985]

La kurtigon de vorto esti ĝis la finaĵo mem signantan la ĝustan tempon ne akceptis la ĉiutaga lingvo, tamen ĝi, aplikata en poezio igis diversecon de formo kaj eblecon pli facile loki la enhavon en difinita verso. Ekzemple:

Macjek, simplul' malriĉa, **is** plej estimata [S.T. VI, 543]

aŭ

Li anstataŭas mastron: se mastro **as** fore [S.T. I, 152]

Aliaj ekzemploj de tiu kurtigo troviĝas en diversaj lokoj de la teksto: stelo as turnita, patro as fore ktp.

Efekte prezentiĝas enkondukita de Grabowski senpera anstataŭo de substantivoj kaj adjektivoj per formoj verbaj:

Eĉ pli malbone, foje en Vilno, nobelo  
Ebria, kun Domejko **sabris** en duelo; [S.T. IV, 884-885]

Hetmano! tre **malcertas** de estroj favoro [S.T. XII, 379]

Tro dekolcita vesto **skandalas** junulon [S. T. V, 369]

Elĉerpita pro la giganta laboro super **Sinjoro Tadeo** kaj pro malbona sanstato Grabowski ne okupiĝis jam per literatura agado. Li estis direktoro de la gramatika sekcio de esperanta Akademio, redaktis kaj finance apogadis revuon „Pola Esperantisto”. Li mortis subite en Varsovio, 4. 07. 1921 j. antaŭ vitrino de librejo, sur kiu li rigardis esperantajn eldonaĵojn.

Alte aprezante enormon kaj kvaliton de liaj efektiviĝoj la esperanta medio agnoskis lin kiel „patron de la esperanta poezio”.

Konata recenzanto kaj poeto, hungaro Lajos Tárkony admire skribis pri li kiel pri „majstro de la verstekniko”, „inĝeniero de ritmo kaj rimo” kaj pri „kuraĝa inventisto de signifoj”.

Ĝis nun verkistoj, poetoj kaj precipe tradukantoj esperanten el naciaj literaturoj povas multe profiti studante la tradukan verkon de Antoni Grabowski.

## **Krakova Societo ESPERANTO**

### **La programo de la renkontoj de januaro ĝis junio 2018 j.**

**11. 01. 2018 j.** – Marta Michałowska. **La rakonto de la budhisma monako.**

**18. 01. 2018 j.** – **La oblata-kantika renkonto. Polaj kantikoj esperantlingve.**

**25. 01. 2018 j.** – Lidia Ligęza. **Kiam oni aplikas akuzativon.**

**1. 02. 2018 j.** – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**

**8. 02. 2018 j.** – Stanisława Śliwińska. **Esperantaj anekdotoj kaj gajaj versaĵetoj.**

**15. 02. 2018 j.** – Alicja Sacha. **Géza Gárdonyi – Sklavoj de Dio. Fragmento de romano.**

**22. 02. 2018 j.** – Lidia Ligęza. **Frazeologio de la vorto „fremda”.**

**1. 03. 2018 j.** – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**

**8. 03. 2018 j.** – **La kluba renkonto okaze de La Internacia Virintago.**

**15. 03. 2018 j.** – Marta Michałowska. **Japana rakonto pri aleo de Matsudaira Masatsuna.**

**22. 03. 2018 j.** – Stanisława Szostak. **Prezento de poezivolumo de Halina Kuropatnicka-Salamon "Elsusuris folioj".**

**5. 04. 2018 j.** – Grażyna Porada. **Proverboj pri ovo.**

**12. 04. 2018 j.** – Lidia Ligęza. **Esperanta vortfarado.**

**19. 04. 2018 j.** – Stanisława Śliwińska. **Edmond Privat. Rakontoj el ciklo Karlo.**

**26. 04. 2018 j.** – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**

**10. 05. 2018 j.** – Lidia Ligęza. **Amo kaj erotiko en la esperanta poezio.**

**17. 05. 2018 j.** – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**

**24. 05. 2018 j.** – **Kluba konversacia renkonto.**

**7. 06. 2018 j.** – Marta Michałowska. **La batala trako de Moseo kaj Josuo. Komentario al programo TV-stopklatka.**

**14. 06. 2018 j.** – Jadwiga Dziegielewska – **Esperantaj aranĝoj en fotoj de Andreo Sochacki. Komentario kun prezento.**

**21. 06. 2018 j.** – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**

**28. 06. 2018 j.** – **Antaŭlibertempa societa kluba renkonto.**